



INFORMILO PRI ETNAJ PROBLEMOJ

Etnismo

N-ro 114 - 31.12.2024

LA ALDONA VALORO
DE LA MINORIGITAJ
LINGVOJ

LA SUKCESOJ DE
AMAZONIAJ INDIĜENOJ
DUM LA COP16
PRI BIODIVERSECO

ELAN: DU-PLURLINGVA
INSTRUADO EN AFRIKO



**Malekvilibra
dulingvismo
en Elzaso**

Etnismo

N-ro 114 - 31.12.2024



Foto de la kovrilo:
Escher Photography

Eldonista letero

► Plimulto ne ekzistas **3**

La regiono Elzaso/Alzaco: Kial malekvilibra dulingvismo **4**

La aldona valoro de la minorigitaj lingvoj **11**

La sukcesoj de amazoniaj indiĝenoj
dum la COP16 pri biodiverseco **13**

ELAN: du-plurlingva instruado en Afriko **13**

Minoritataj etnoj havas infanojn,
sed ili transiras al la rusa lingvo **17**

Koncize el... **18**

IKEL-informilo n-ro 92 **19**

La membroj de la **Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL)** ricevas **Etnismo**-n sen krompago, minimume 36 paĝojn jare. Unuopa ekzemplero de simpla numero kostas 5 €. Ĉiuj eroj de la «**IKEL-Infomilo**» estas oficialaĵoj. La aŭtoroj ne ricevas honorarion. La redaktoro rezervas al si la rajton ne publikigi, mallongigi kaj lingve korekti la kontribuojn.

La artikoloj publikigitaj en **Etnismo** ne nepre esprimas starpunkton de **IKEL**, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

Eblas reklami en **Etnismo**!

- **Anonstarifo:** (EUR): 1 p. 80, 1/2 p. 45, 1/4 p. 25, 1/6 p. 15.
- Rabato por IKEL-membroj: 10 %.

Estraro:

- **Prezidanto:** **Alain FAVRE** (savoĵano),
Damo de Vi, 171 allée du Quart d'Amot,
FR-74140 Chens-sur-Léman, tel: +33682093845,
retadreso: afavre1@hotmail.com
- **Vicprezidanto kaj redaktisto:** **Nicole MARGOT** (vaŭdanino),
ch. des Lys 4, CH-1010 Lausanne
tel: + 41 21 653 14 67, retadreso: n.margot@bluewin.ch
- **Grafiko:** **Ferriol MACIP i BONET** (kataluno)
Carrer de la Font Florida, 86, 1r 1a, 08004 Barcelona
Tel: +34 625 469 373, retadreso: farri@mac.com
- **Sekretario:** **Nikolas XIL CARVALHO** (asturleono),
48 postakutxa. 20400 Tolosa. Gipuzkoa. Eŭskio/EH
tel: ++ 34 630 44 68 63,
retadreso: fokomelo-makolji@protonmail.com
- **Kasisto:** **Xabier RICO ITURRIOTZ** (eŭsko),
Manuel Iradier, 22-1-ekz. ES-01005 Gasteiz,
Euskal Herria-Eŭskio, retadreso: xabirico@outlook.com
- **Rilatoj kun esperanto-gazetoj. Reviziado:**
István ERTL (hungaro),
22, rue Fautelfiels, LU-7355 Helmdange, Luksemburgio,
tel. ++ 352 2633-2659, retadreso: istvan.ertl@gmail.com
- **Kunrevizianto:** **Nancy FONTANNAZ**
- **Estrarano:** **Hèctor ALÒS i FONT** (kataluno),
Mir pr. 15-55, RU-428024 Shupashkar, Ĉuvaŝio, Rusia Federacio
retadreso: hectoralos@gmail.com
- **Sociaj retoj:** **Aleksandr BLINOV** (ĉuvaŝo)
- **Retejo:** www.etnismo.org
- **Forumo:** etnismo@googlegroups.com

Kotizoj kaj kontoj:

Kotizo	eŭroj
Normala	20.00
Subtenanta	30.00
Rabatita	10.00

La rabatitan membrecon rajtas ĝui ĉiu persono, kiu aŭ loĝas en (eks) socialisma aŭ «tria-monda» lando, aŭ estas studento aŭ emerito.

Pere de UEA

- Se vi havas konton ĉe UEA
UEA (kodo: ikel-y):
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
(Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam)
- Transpago al la bankkonto de UEA (Tiukaze aldonu 5% al la kotizo):
ING Bank, Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64
BIC/SWIFT: INGBNL2A

Ĉiukaze indiku "ikel-y" kaj la celatan jaron. Bonvolu nepre certigi, ke via kompleta kotizo alvenas al la IKEL-konto: IKEL absolute ne povas transpreni kiajn ajn banko- aŭ peradkostojn!

Pere de la kasisto de IKEL

- Pago per **Paypal konto** al **Xabier Rico Iturriotz**,
retpoŝto : xabirico@outlook.com
- Vi povas ankaŭ ĝiri vian kotizon al la persona konto de la kasisto de IKEL. Se vi volus tiel agi, sendu retpoŝton al la kasisto.
- Pere de jenaj aplikajoj al la poŝtelefono de la kasisto: +34655727215
 - ✓ VERSE ekde pluraj landoj de la EU kaj ekde Britio (konsultu ĉe www.verse.me)
 - ✓ BIZUM ekde Hispanio, Eŭskio kaj Katalunio

Perantoj

- Katalunio, Eŭskio, Hispanio: Sandra Vives: sandra@esperanto.cat
- Francio: Alain Favre, Damo de Vi, 171 allée du Quart d'Amot,
FR-74140 CHENS/LÉMAN afavre1@hotmail.com
(vi povas sendi ĉekojn).
- Norvegio : oficejo@esperanto.no

Venonta redaktolimdato: 30an de septembro 2024



ELDONISTA LETERO

Plimulto ne ekzistas

Alain Favre

De pluraj jardekoj ŝajnis, ke la situacio de malplimultoj tendencas pliboniĝi, jam en la tiel nomata okcidenta mondo, sed ne nur. Etnaj, seksaj, foje religiaj minoritatoj akiris rajtojn, same kiel malplimulto plimulta, tio estas virinoj. Indiĝenaj popoloj povis agnoskigi la gravecon de sia kulturo kaj de sia lingvo ankaŭ ĉe UN, ĉefe se ili tion faris en la angla. Iuj havis la impreson, ke finfine demokratio venkos, ke ĉiu homo estos respektata internacie same kiel en la propra lando. Oni vidis ja ne aparte facilan kaj rapidan evoluon, sed entute pozitivaj devintus superi kaj konduki al iaspeca fina venko de la homaj rajtoj, individuaj kaj kolektivaj.

Sed tiu epoko, kiom ajn proksima ĝi estas, videble tute finiĝis. Demokratio estas pli kaj pli flankenmetita,

oni povas konstati, ke nur pura forto, se ne diri perforto, rajtas venki. Pri Ĉinio kaj Rusio oni ne tiom miras, de jardekoj (jarcentoj?) per perforto ili funkcias. Sed Usono, la iama ĝendarmo de la mondo (ja foje kun teruraj malsukcesoj, kiel en Vjetnamio, Irako kaj Afganio), eble fariĝos baldaŭ la unua bandito de la mondo. Ĝi ŝajnas pli danĝera por siaj aliancanoj ol por la kutimaj malamikoj. Kaj Eŭropo? Inventinteĵo de multaj postkristanaj konceptoj, kiuj kondukis al demokratio kaj homaj rajtoj, nia kontinento ne plu aparte brilas sur tiu tereno. Mi apenaŭ povis kredi, kiam mi aŭdis ĉe radiokanalo, ke ĉefino de forta ekstremdekstra partio, kiu subtenas la tradician koncepton de la familio, vivas eksterlande kun alia virino kaj iliaj infanoj. Racio ŝajnas tute malaperi.

Iuj tamen volas pravigi tiun fenomenon: tro longe regis malplimultoj, nun venas la

”Atakoj plimultiĝos, novfaŝismo ŝajnas progresi, foje triumfi sur ĉiu kontinento, apogite de teruraj armiloj kaj retejoj aŭ amaskomunikiloj regataj de finance potencegaj individuoj kun tre personaj kialoj

vico de la plimulto. Sed kio estas plimulto? Viroj ne estas plimulto. Ĉasistoj ne estas plimulto. En iu ajn lando parolantoj de la ĉefa lingvo ne ĉie estas plimulto, almenaŭ ne en ĉiu domo. Kaj estus terure devigi iujn manĝi vian don, trinki brandon dirante, ke tion faras la plimulto. Oni facile povas respondi, ke demokratio elektiga plimulto.

Sed tio okazas ĝuste ĉar oni rajtas per voĉdono ŝanĝi tiun politikan plimulton. Entute eterna, “esenca” plimulto ne ekzistas. Ekzistas miloj da kredoj kaj sintenoj, kiuj povas ŝanĝiĝi dum vivoj kaj epokoj, necesas provi kiel eble plej harmonie kunvivi ilin, kiam ili respektas la kredojn kaj sintenojn de la aliaj. Ni etnistoj estas je la unua loko por tion defendi. Atakoj plimultiĝos, novfaŝismo ŝajnas progresi, foje triumfi sur ĉiu kontinento, apogite de teruraj armiloj kaj retejoj aŭ amaskomunikiloj regataj de finance potencegaj individuoj kun tre personaj kialoj. Kontraŭ tio batalas ankaŭ la ekstreme malforta revuo *Etnismo*, sed ni fiere diru, ke mankus io al la mondo, se ĝi ne ekzistus.

Plu kalkulante je via nemalhavebla subteno, mi deziras al vi sufiĉe da sano, forto kaj kuraĝo por trairi tiun novan jaron, kiu (jam) inaŭguras la duan kvaronon de nia jarcento. ■

La regiono Elzaso¹/Alzaco: Kial malekvilibra dulingvismo?

Edmond Ludwig



Monumento memore al la "Malgraŭ ni" en Obernai (Malalta Rejno).

La sekva teksto estas postprelega redaktaĵo de notoj uzitaj dum prelegeto unuhora okaze de la Eŭropa Kongreso de Esperanto okazinta en Strasburgo de la 8-a ĝis la 12-a de majo 2024. Saluton al vi! *Sàlüt binànder! S'freit mi, àss Ìhr zu uns ìns Elsàss komma sìn! Villicht hera Ìhr aui*

unseri Sproch in Stroßburg. Villicht oder kùm noch, denn Stroßburg ìsch jetzt a internàtionàli Stàdt wora.

Vi aŭdis mian mallongan saluton *uff Elsasserditsch*, t.e. en varianto de la elzas-germana² dialekto, - pli precize en alemana varianto - parolata en la suda parto de Elzaso. Norde de Elzaso parolatas franka varianto. Laŭ OLCA (*Office pour la lan-*

gue et culture d'Alsace - Oficejo pri la elzasaj lingvo kaj kulturo) parolis iom pli ol 600 000 homoj elzas-germanan varianton de nia lingvo en 2014 (Loĝant-oj: 1,8 milionoj). La elzasgermana restas do la plej parolata regiona lingvo en Francio. Sed laŭ enketo: en 2022 nur 4 ĝis 5% de la infanĝardenanoj (ek de trijaraĝaj infanoj ĝis la 6-jaraĝaj) ĝin denaske parolis.

1. Elzaso (ekster-PIV-a termino): Volonte mi substrekas la germanecan originon de la regiono.

2. Kiam finiĝis la nazia okupo de Elzaso, la kutima termino elzasgermana estis anatataŭgita per "la elzasa dialekto" por forgesigi la ligan kun Germanio dum la Dua Mondmilito.



En Strasburgo mem vi eble ne plu, aŭ nur malofte aŭdos nian regionan lingvon, ĉar Strasburgo iĝis vere internacia urbo pro la sidejoj de pluraj eŭropaj instancoj kaj ankaŭ pro la multaj enmigrintoj, el “interna Francio”³, t.e. el la trans-Vogeza Francio, sed ankaŭ el la tuta mondo.

Tamen vige plu vivas la lingvo en la vilaĝoj, ĉefe norde de Strasburgo. La ĝermaneco daŭre plu videblas pro la trab-fakaj domoj, la familiaj nomoj de multaj loĝantoj (germana famili-nomo kaj franca persona nomo), pro la pli kaj pli multaj dulingvaj stratnomoj (eĉ se la germana aŭ elzasgermana stratnomo ofte aperas nur malgrandlitere sub la franclingva). Daŭre disputas legantoj en la regionaj gazetoj pri la elekto de la germana aŭ de la elzasa varianto!

Mia prelegeto titoliĝas: “La regiono Elzaso/Alzaco: kial malekvilibra dulingvismo?” Kvan-

kam la nomo de mia regiono nomiĝas Alzaco laŭ PIV (Plena Ilustrita Vortaro), mi ek de mia esperantistigo obstine ĝin nomas Elzaso pro la ĝermandevena lingvo parolata ĉi tie de pli ol 1500 jaroj. (Pri tiuj du terminoj, iom pli detale fine de la prelego).

La kunmetita mapo (fakte Elzaso kaj la germanlingva departemento Mozelo) post la franc-prusia milito en 1870-1871 montras Elzason inter la Vogeza Montaro okcidente kaj la Rejno oriente. Mi klarigu tuj, ke dum ĉi prelego mi parolos nur pri Elzaso, kvankam la germanlingva departemento Mozelo lingve samsortas kiel Elzaso. Necesas krome, ke mi precizigu, ke laŭ la preparolata periodo la geografiaj limoj tre ofte ne tute kongruas kun la lingvaj lim-teritorioj.

Kial ĝermana lingvo en nia regiono?

Pro la mallonga tempo de mia prelegeto kaj pro la fakto, ke mi ne estas profesia historiisto, mi nur ege mallonge skizos la historion de tiu regiono. Kaj tuj



necesas precizigi, ke kio aperas sur la mapo kiel sufiĉe unueca teritorio konsistis dum longaj jarcentoj en kunfikaĵo da etaj posedaĵoj de tiamaj potenculoj.

La mapo montras Elzason inter la Vogeza Montaro okcidente kaj la Rejno oriente.

Antaŭ la romianoj setlis tie keltoj. Venis poste diversaj etnoj el oriento, inter ili germanlingvaj alemanoj kaj frankoj. Tiuj frankoj ricevis de la modernaj francaj historiistoj franclingvajn nomojn. Ekzemple la merovingo *Hlūdawīg* (laŭ la malnovfranka lingvo) iĝis *Clovis*. Poste la franko *Karl der Große*, naskiĝinta en *Hagenau*, iĝis *Charlemagne*. Alvenis poste la Hohenstaufen-dinastio, kiu originis el Ŝvabio: la alemano *Friedrich Rotbart* iĝis *Frédéric Barberousse* en la franca lingvo. Poste, dum pluraj jarcentoj, regis la Habsburga dinastio. Ĝi originas en la svisa vilaĝo Habsburg (Argovio). La habsburga imperiestro *Karl der Fünfte* do iĝis *Charles Quint*!

3. Interna Francio: nomo donita de la elzasanoj al la francoj de la trans-Vogeza parto de Francio.

Mi rememorigu, ke tiam la prestiĝa lingvo de la elito estis la latina lingvo, la lingvo de la pro sia progresinta civilizacio daŭre admirata romia imperio. La elitoj do latinigis siajn nomojn. Kaj de la latina al la franca...!

Mi limigu min je kelkaj gravaj datoj:

- La 14-an de februaro 842 renkontiĝis en Strasburgo du nepoj de *Karl der Große*, *Ludwig der Deutsche* kaj *Karl der Kahle*, por sin ligi kontraŭ sian pli aĝan fraton *Lothar*. Por fortigi tiun interkonsenton, ĉiu prononcis la ĵuron en la lingvo de la alia kaj iliaj akompanantoj faris tion ĉiu en sia propra lingvo. La du lingvoj estis la prafranca kaj la pragermana. Kial ne nomi tiun ĵuron unua monumento de la eŭropa kulturo? Cetere: en 843, dank'al la traktato de *Verdun*, la 3 nepoj repaciĝis.
- 962: aperis la Sankta Romia Imperio de Ĝermana Nacio⁴. Ekde tiam la teritorio de la aktuala Elzaso aperis pli kaj pli ofte en tiamaj tekstoj. La nomoj de la regiono laŭdire signifas: “die ander Ill saßen”, kio signifas “tiuj, kiuj setlis ĉe la rivero Ill”.
- 1324: la elzasa urbo *Ensisheim* iĝis eĉ ĉefurbo de habsburga teritorio nomita *Vorderösterreich* (Antaŭa Aŭstrio) ĝis la fino de la Tridekjara Milito, en 1648. Tiu administretejo konsistis el teritorioj sudelzasaj, badenaj, ŝvabaj (ĝis la monto *Arlberg*) kaj svisaj.
- Same en 1324 la dukoj de Virmembergo akiris per geedziĝo la urbojn *Riquewihr* (*Reichenweier*) kaj *Horbourg* (*Horburg*) kaj eĉ *Montbéliard* (*Mömpelgard*).
- 1342: kreiĝis la “*Zehnstädtebund*” (Ligo de la 10 liberaj urboj). Tiuj urboj sin ligis por komuna defendo kontraŭ malamiko. Ili estis reprezentitaj en

la Dieto kaj dependis rekte de la imperiestro. Post peto de protekto al la franca reĝo Ludoviko la 14-a ĝi perdis potencon kaj formale malaperis dum la Franca Revolucio.

- En 1450 realiĝis grava teknika invento, kiu iĝis iu akcelilo de iom post iom amasa disvastigo de informoj: la presarto. En 1434 *Johannes Gensfleisch* (alias *Gutenberg*) alvenis al Strasburgo, kie li sin perfektigis en la uzo de metaloj por presado kaj inventis baldaŭ teknikojn por la moderna presarto. La preso de la fama Biblio de *Gutenberg* okazis post lia reveno al sia naskiĝurbo *Mainz* en 1450. Tiu tekniko ebligis al la tiamaj intelektuloj, la humanistoj, disvastigi siajn pensojn, unue en la latina lingvo.
- En 1535 *Martin Luther* tradukis la biblion en germanan lingvon, kiun li igis komprenebla al legantaro de diversaj germanlingvaj variantoj. Necesas insisti pri la fakto, ke la protestanta religio emfazis la ĉiutagan legon de la biblio por “rekta rilato kun Dio”, kio kompreneble ankaŭ favoris la disvatiĝon de la legokapablo en la protestantaj regionoj, ekzemple ankaŭ en Elzaso.
- En 1539 *Jörg Wickram* el *Colmar* aperigis la unuan romanon en la “vulgara” germana lingvo tiam: *Ritter Galmy*. (Kavaliro *Galmy*) kaj en 1555 la presejo *Knobloch* en Strasburgo presis rakontaron de la sama *Jörg Wickram*, *Das Rollwagenbüchlein*, uzatan por distri la vojaĝantojn dum la tiamaj longaj vojaĝoj perĉaraj. Jen jam ia senelektra “ĉaroradio”!
- En 1605 *Johann Carolus* (fakte *Carlen*) de la elzasa vilaĝo *Mühlbach*, filo de la loka pastoro, lanĉis en Strasburgo la unuan gazeton en la mondo (!!!): *Relation aller Fürnemmen und gedenkwürdigen Historien* (Prezento de ĉiuj gravaj kaj memorindaj okazintaĵoj).



Vitralo konservita en la Historia Muzeo de Haguenau. Rikardo Leonkoro antaŭ Henriko la 6a en 1193.

Eko de iom-post-ioma francigo

Ekde 1648, post la traktato de *Münster in Westfalen*, la elzasaj teritorioj iom post iom iĝis francaj – *Straßburg* nur en 1681, *Mühlhausen* ... nur en 1798). Ni tamen memorigu, ke en 1770 tiu, kiu iĝis la plej renoma germana verkisto, *Johann Wolfgang Goethe*, studis ĵuron en Strasburgo dum unu jaro, eĉ se li ĉefe okupiĝis pri kolektado de tiamaj lokaj tradiciaj kantoj kaj rakontoj, same kiel tion faris lia kolego *Johann Gottfried Herder*. En *Sessenheim* li ja renkontis *Friederike Brion*, kiu estis nur unu inter liaj multaj amaferoj!

Post 1789, dum la Franca Revolucio, la francigo – kaj ne nur en Elzaso – ekdinamikis. La eminenta scienculo abato Grégoire aplikigis disponojn por francparoligo de la loĝantaro, kiun necesis efike administri. La lingva situacio ja estis ege diversa en

4. Ĝermana Nacieco aldoniĝis nur en la 15-a jarcento.



GLENN J. MASON EL LONDONO

«Rigardu mian presitan gloron» ĝojegis Gutenberg

la lando. Bildan kaj sonan impreson vi ĝuu en la retejo <https://atlas.limsi.fr/>. Komenciĝis tutlanda kampanjo kontraŭ la diversaj lingvoj, kiujn oni baptis nuraj dialektoj parolataj de nekulturitaj kamparanoj. Kreiĝis eĉ pli aĉiga vorto franca por dialektoj: patois! Rimarkindas, ke ĝi daŭre ofte uzatas en la francaj amaskomunikiloj.

La militema imperiestro Napoleono la 1-a bezonis ĉiujn francojn por batali, do la lingvo ne ŝajnis esti prioritato. Pri la sufiĉe grandnombraj elzasaj generaloj li deklaris: “Lasu ilin paroli germane, plej gravas, ke ili spadu france”.

Sekvis la reĝoj Ludoviko la 18-a, Karlo la 10-a, revolucio en 1830, la reĝo Ludoviko Filipo, revolucio en 1848 kaj la imperiestro Napoleono la 3-a. Dum tiuj sinsekvaj reĝimoj la problemoj de la lingvo en Elzaso ne ŝajnis esti grava kaŭzo de konflikto.

1870-1871 Prusia rekonkero ĝis fine de la 1-a Mondmilito: kiel naciigita Germanio kreis elzasan nacieton

La prusianoj tuj konsideris, ke Elzaso daŭre estas etne germana kaj do reoficialigis la germanan lingvon kiel nacian lingvon. Sur tiu malgranda teritorio, kie la germana lingvo grandparte daŭre pluvivis, ne ŝajnis ekzisti gravaj rezistoj. La edukistaro kreis jam en 1871 devigan instruadon ekde la aĝo de 6 jaroj - en Francio nur en 1882. La germana lingvo iĝis deviga. Estis fakto, ke en 1870 la germana lingvo ankoraŭ daŭre nature uzatis en Elzaso. Kontribuis al la disvastigo de la lingvo la eklezioj, ĉar la germana lingvo estis la lingvo de la katekismo: la prusianoj estis protestantoj kaj la luteranoj pro tio ideo proksimis. Inter la katolikaj ekleziuloj edukitaj en la francaj episkopaj seminaroj regis inklinado al la franca, sed pli kaj pli da ili vidis en la uzo de la franca lingvo transportilon de kontraŭreligiaj ideoj. Tamen notindas, ke en la ĉelimaj regionoj, ekzemple en la Vogezaj valoj, kie parolatis latinidaj dialektoj, la franca lingvo estis daŭre instruata apud la germana.

De 1771 ĝis 1918 la germana lingvo regis dum preskaŭ 50 jaroj. Do kvaŭ tri generacioj vivis germanlingve, faris sian karieron, iĝis germanaj soldatoj. Kompreneble estis tiuj, kiuj plene konsentis, tiuj kiuj kontraŭis kaj tiuj kiuj adaptiĝis. Por tiuj, kiuj post 1971 deziris forlasi Elzason, la germana imperio kreis la statuson de “opcianto”: ili rajtis vendi siajn posedaĵojn kaj migri al Francio. Tiuj, kiuj restis kaj deziris montri sian malkontenton pli kaj pli promociis la uzon de la elzasa dialekto, verkis ankaŭ en la dialekto kaj tiel disvastigis iom post iom iun elzasan specifan kulturon. Naskiĝis tiel pli unuigita nacio! Cetere ekde tiam difiniĝis la unuaj modernaj limoj inter nacioj, poste eĉ ĉielaj limoj pro la naskiĝinta aviada trafiko⁵.

5. *L'invention d'une frontière entre France et Allemagne 1871-1914* Benoît Vaillot CNRS – Éditions.

Pli kaj pli da elzasanoj sin adaptis kaj profitis la modernigadon de la regiono dum tiuj 47 jaroj: moderna akvosistemo eĉ en malgrandaj vilaĝoj, gaso kaj elektro en la urboj, konstruado de la *Neustadt* en Strasburgo (t.e. la nova centra administra kvartalo), modernigo de la urboj, sociaj leĝoj adoptitaj ekde 1888: avangarda sistemo de asekuro por malsano, laborakcidentoj kaj senlaboreco, kreo de lokaj ŝparkasoj. Relanĉo de la universitato de Strasburgo, kiu “produktis” plurajn Nobel-premiitojn. En 1911 la regionaj politikistoj eĉ sukcesis havi regionan parlamenton! Bedaŭrinde iom post iom – pro la denova milita etoso – la reĝimo iĝis pli kaj pli diktatoreca.

Post la Unua Mondmilito

Ĉe la fino de la milito Elzaso denove apartenis al la franca ŝtato, kiu akre forpelis cent milojn da germanoj kaj iliajn subtenintojn. Nur personajn necesajn aĵojn ili rajtis kunporti, fikriantaj kaj kraĉantaj gvatantoj ilin ofte sekvis dum ilia fuĝado.

La elzasanoj ricevis laŭkategorian civitanekon kun identeckarto kun specifa litero:

- A – por tiuj, kies gepatroj naskiĝis antaŭ 1870
- B – por tiuj, kiuj havis nefrancisajn patron
- C – por tiuj, kies gepatroj naskiĝis en aliancita aŭ neŭtrala lando
- D – por tiuj, kies gepatroj naskiĝis en malamika lando.

Jen kio ne pacigis la homojn! Iuj esperis memdecidon pri aŭtonomio de Elzaso-Mozelo, sed la usona prezidento *Wilson* ne akceptis tion. Regis do denove Francio, kiu deziris altrudi la tutnaciajn leĝojn, ekzemple la leĝon de 1905 pri laikeco! Sed tiam leviĝis ribelo, kiu originis de la



CHARLES DAVID WINTER (1821-1904)

Vido de Strasburgo la 28an de septembro 1870 dum la francprusa milito.

religiuloj en la paroĥoj, kiuj deziris konservi la avantaĝojn de la Konkordato decidita de Napoleono la 1-a en 1802 kaj kiun konservis la germanoj: la pastroj, pastoroj kaj rabenoj estu pagataj de la ŝtato kaj kursoj pri religio estu daŭre organizataj en ĉiuj publikaj lernejoj. La civitanoj ankaŭ deziris konservi la favorajn sociajn servojn, kiujn ili ĝuis dum la germana regado. Nu: la ŝtato devis cedi. Ekde tiam daŭre regas en Elzaso-Mozelo tiu loka rajto⁶.

Kompreneble la lingvo iĝis denove la franca, sed... tri generacioj de la elzasanoj ja parolis ekskluzive la germanan lingvon! Do necesis lerni la francan lingvon. La instruistojn kaj

aliajn ŝtatoficistojn la registaro sendis trans-Vogezon por intensa lernado de la nacia lingvo kaj al Elzaso-Mozelo venis anstataŭe francparolantaj oficistoj. Sed la germana lingvo estis daŭre instruata kaj la regionaj gazetoj aperigis francan eldonon kaj ĉefe germanan eldonon.

La celo tamen restis la elradikigo de la germana lingvo. Laŭmodis la termino “*boche*” – prononcu “boŝ”, pejorativa nomo por la germanoj uzita jam dum la Unua Mondmilito en tuta Francio. Kaj oni ridindigis la elzasanojn, kiuj parolis la francan lingvon kun “boŝa” akcento. La plej akran kampanjon kontraŭgermanan lanĉis elzasa daŭre fama pentristo/desegnisto/karikaturisto, *Jean-Jacques Waltz*, alias *Hansi*, kiu

jam dum la germana regado akre kritikis la prusojn. Dum la Unua Mondmilito li oficis kiel spiono en la apuda Svislando. Sian kontraŭgermanecon li jam diskonigis per siaj eldonaĵoj: *Professor Knatschke* (1908), *L'Histoire d'Alsace racontée aux petits-enfants par l'Oncle Hansi* (La Historio de Alzaco rakontata al la genepoj de Onklo Hansi) kaj multaj aliaj. Ĉiuj bildlibroj cirkulis en Francio.

Kompreneble pro tiu antagonismo naskiĝis aŭtonomisma movado, kiun la registaro kontraŭbatalis, akuzante ĝiajn anojn pri kaŝata aspirado al realigo al Germanio. Tiu akuzo iĝis des pli akra, kiam la nazioj komencis regi transrejne. Granda parto de la elzasanoj subtenis la movadon. Pluraj gvidantoj iĝis eĉ deputitoj. Sed tiu akuzo

6. <https://www.alsace.eu/media/7419/cea-droit-local.pdf>

de apartigismo kaj de kontraŭrepublikanismo iĝis des pli akra, kiam la nazioj komencis regi trans-Rejne. Pluraj gvidantoj de la movado estis enkarcerigitaj kaj akuzitaj pri kunlaborado kun la nazia registaro. Unu inter ili, *Karl Roos* estis eĉ mortkondamnita kaj mortpafita en *Nancy* en 1939.

La Dua Mondmilito (1939 - 1945)

En 1940 la nazia Germanio invadis Elzason kaj Mozelon. La teritorio Elzaso-Mozelo iĝis nedisigebla parto de Germanio. Elzaso estis alligita al la distrikto Badeno kaj Mozelo al la distriktoj Sarlando kaj Palatinato. Ambaŭ regionoj estis estrataj plej diktature de la “*Gauleiter*” *Wagner* kaj *Bürckel*, kiuj disponis pri ĉiuj ajn povoj. La germana lingvo kompreneble ree iĝis deviga kaj la uzo de la franca eĉ severe malpermesita. Ĉiuj strat- kaj placonomoj estis germanigitaj. La elzasajn aŭtonomistojn la nazioj nomis herooj!!! Inter 1942 kaj 1945 la nazia reĝimo soldatigis kontraŭvole pli ol 130 000 Elzasanojn kaj Mozelanojn, (“*Les Malgré-Nous*”). Multaj mortis dum la bataloj aŭ kiel militkaptitoj de la rusoj.

Por havi neŭtralajn informojn pri la milito multaj elzasanoj aŭskultis kaŝe la svisan radiostacion *BEROMÜNTER*. Eĉ post la milito tiu elsendejo laŭmodis.

Post 1945

Eblas tuj deklari senerare, ke *Hitler* kaj ties reĝimo plej efike helpis al malamigo de la germana lingvo en Francio!

Post la reiro de Elzaso Francien la franca lingvo tuj denove retrovisian lokon. La instruado de la germana lingvo oni malpermesis en la elementaj lernejoj. Tuj, ekde la aĝo de 3 jaroj en la infangardenoj, la infanoj estis metitaj en francan “lingvobaron”. Kaj necesas agnoski: la metodo efikis. Paralele kompreneble ankaŭ helpis psikologia influado pro la rea kvalifiko “boŝa” de ĉio germa-

na kaj la reklamado per la afiŝado de la slogano “*Ŝikas parolis france*”. Kiel jam dirite: helpis la disvastigita sento de honto, kvankam la plejmulto neniel volonte kunlaboris kun la nazia reĝimo.

Sed por la plej multaj elzasanoj la elzasa restis la familia lingvo. Rimarkeblis, ke tio ofte ne validis por familioj de instruistoj, kiuj ja “devis devigi” siajn gelernejanojn paroli ekskluzive la francan, do ankaŭ siajn gefilojn. La katekismo kaj la diservoj majoritate pluokazis en la germana lingvo.

Ankaŭ la radioj regionaj elsendis en la elzasa. Krome denove aperis teatrotrupoj, kiuj plej ofte ludis kaj ankorau aktuale ludas elzaslingve - ĉefe komediojn.

La kresko de la uzo de la franca lingvo mezureblis per la eldonnombro de la germanlingvaj kaj franclingvaj eldonoj de la regionaj gazetoj *Les Dernières nouvelles d'Alsace* kaj *L'Alsace*. Tutmaniere en la ambaŭlingvaj eldonoj la vasta paĝaro prisporta daŭre aperis en la franca, por ke la gejunuloj praktiku la francan lingvon. Devige aperis en la franca la mortanoncoj kaj la reklamoj.

Sed radioelsendoj en la elzasa pludaŭris dum kelkaj dekoj da jaroj, eĉ se la bildlibroj de *Hansi* estis daŭre plureklamitaj. La termino elzasgermana ne plu uzatis, oni parolis – kaj daŭre parolas nuntempe – nur pri la elzasa dialekto! Nia lingvo ne aspektu germaneca!

Pro la peto de la plejmulto de la gepatroj la instruado de la germana lingvo reaperis en la elementaj lernejoj en 1952 ekde la aĝo de 11-a jaroj. Ĝin instruis plej ofte instruistoj specialigitaj, kiuj vojaĝis de unu elementa lernejo al alia per biciklo. Ili estis nomataj “*die Veloschwowa*”. Sufiĉe longe

tio kaŭzis akrajn konfliktojn. En la kolegioj kaj liceoj ĝi daŭre estis instruata kiel eksterlanda lingvo.

Vekiĝo post 1968

La studenta revolucio de 1968 subite ankaŭ vekis konsciigon pri la graveco de la regiona kultura aparteco. Unue ĉefe lige kun la vekigo de ekologiaj ideoj okaze de la opono al konstruo de atomcentraloj en Elzaso (*Fessenheim*) kaj en la najbara Germanio. La luktoj estis komunaj, trans-Rejnaj. Tiel en Elzaso la lukto ankaŭ ree koncernis la lingvon.

La subteno venis de lokaj kantistoj, poetoj, verkistoj kaj aliaj intelektuloj. Mi citu nur la plej faman elzasan verkiston: *André Weckmann*, eksan dizertintan “*malgré-nous*”, kiu sukcesis konsciigi, ke germana ne signifas nazia.

Socialista regiona rektoro, respondeculo pri edukado, *Pierre Deyon*, oficiale deklaris, ke la elzasaj dialektoj estas variantoj de la germana lingvo. Ankaŭ estis lanĉita la slogano: lernu la lingvon de la najbaro, ankaŭ en Germanio. Jen kio donis impulson, kvankam la germana ja estas ... ankaŭ la lingvo de Elzaso!

Iom post iom eblis efikigi la instruadon de la germana lingvo. Aperis la aŭdvidaj dinamikigaj metodoj. Kaj lanĉis fama ĝenerala inspektoro pri la germana lingvo, *Georges Holderrith*, specifan metodon por la parolantoj de la elzasaj dialektoj. Eblis krei specialajn klasojn por tiaj gelnantoj kaj la nivelo ege altiĝis. Ankaŭ la jam citita *André Weckmann* verkis metodon ege altnivelan. Bedaŭrinde, malgraŭ ĉiuj klopodoj, iom post iom perdiĝis en la socio la uzo de la dialekto, kvankam, eĉ nuntempe en 2024, pluekzistas en Elzaso pli ol 180 teatrotrupoj!

7. a *Šwob – die Šwowa*: la ŝvaboj estas la plej najbaraj germanoj, sed en Elzaso la termino difinas ĉiujn germanojn.

Sed la gepatroj pli kaj pli postulis instruadon de la angla lingvo. La ministerio tiam proponis – unue post selekto de la plej kapablaj gelernantoj – samtempan instruadon de du fremdaj lingvoj (plej ofte en Elzaso la germana kaj la angla) ekde la unua jaro de la kolegio, sed nur po tri horoj semajne. Tamen tio ne ebligis atingon de vera dulingvismo.

Necesis do nova paŝo: krei dulingvajn klasojn. Sed la jakobenaj ideoj en la franca ŝtato daŭre bremsis ĉiujn iniciatojn. En 1990 juna instruisto pri la franca, *Richard Weiss*, kun la helpo de la psikolingvisto *Jean-Petit*, kreis kun trideko da gepatroj la unuan asocian dulingvan lernejon en Elzaso. Ilia asocio nomiĝas *A.B.C.M. Zweisprachigkeit* (Asocio pri la dulingvismo ek de la infanĝardeno). La instruado okazas en la dialekto, germana kaj franca, kaj krome pluraj fakoj instruatas en unu aŭ la alia lingvo. Tiaj asociaj klasoj disvastiĝis, ankaŭ en Baden-Virtembergo. Honorprezidantis la fama desegnisto-karikaturisto *Tomi Ungerer*. De du jardekoj tiuj klasoj demonstras, ke tiu triopa oferto (dialekto-germana - franca) funkcias!

Nun ekzistas ankaŭ dulingvaj klasoj en la publikaj lernejoj, sed ofte mankas gelernantoj kaj ... ekde la jaro 2020, mankas ankaŭ instruistoj pri la germana kaj instruistoj kapablaj instrui alian fakon en la germana. En la universitato de Strasburgo la nombro de la studentoj pri la germana lingvo same draste reduktiĝis. La ŝtato provas rekruti germanlingvajn geinstruistojn en Germanio, Svislando aŭ Aŭstrio, sed ĉar la salajroj de la instruistoj en tiuj landoj superas la francajn salajrojn, ne svarmas la kandidatoj.

Necesas akcenti, ke la dulingvaj klasoj ebligas al eta procentaĵo de tiuj gelernantoj obteni sufiĉe altan lingvonivelon por sukcesi je la dulingva bakalaŭro *ABIBAC*. Sed tio restas margena elito!

Aldono: Estis realigita en la okdekaj jaroj en kolegioj kaj liceoj opcia fako nomata *LCR (Langue et Culture Régionales* – Regionaj lingvo kaj kulturo). Tiu opcio daŭre ekzistas, sed la regiona kulturo estas pli kaj pli ofte instruata en la franca lingvo kaj ne plu en la elzasgermana, kiun nesufiĉa kvanto da gelernantoj regas.

Amara konkludo

Ĝenerala dulingvismo francgermana ne estas atingita. La plenkreskuloj ankoraŭ sufiĉe regas la elzasgermanan, sed la vortoriĉeco de tiuj parolantoj malvastiĝas pro la nescio de la iama germana lingva lakto! Kial la familioj neglektis la uzadon de la elzasgermana dialekto en la familio??? Neniu ja malpermesis al ili ĝin paroli en sia hejmo kaj eĉ publike!!!

Malgraŭ ĉio ĝis nun daŭre furoras la teatraj trupoj elzaslingvaj, la populara germana alpomuziko kaj la germanaj ŝlagroj. Ankaŭ la vintra turismo al la svisaj, bavaraj kaj aŭstraj Alpoj estas ŝatata. Multaj urboj kaj vilaĝoj nun afiŝas iun videblan dulingvecon per fiksado de dulingvaj strat- kaj placonomoj, eĉ se ofte furoras disputoj koncerne la preferatan uzon aŭ de la elzasa, aŭ de la germana,.... kiu rememorigus pri la nazia epoko! Mortononcoj en la gazetoj kaj reklamoj nun estas permesataj, sed ne plu ekzistas dulingvaj eldonoj de la regionaj gazetoj *L'Alsace* kaj *Dernières Nouvelles d'Alsace*! Tamen notindas, ke dank'al sia scio de la elzasa kaj/aŭ de la germana daŭre multaj elzasanoj trovas laboron en la apuda Germanio, Svislando kaj Luksemburgo.

Naskiĝinte en 1949 mi traspertis ĉiujn fazojn de la evoluo de la lingva situacio post la Dua Mondmilito. Mi kreskis en elzasa familio, kies ĉiutaga lingvo estis la elzasgermana dialekto. Ĉar mia patrino devenis de Aŭstrio, mi havis la okazon restadi ferie ĉe familianoj en pluraj regionoj de Aŭstrio kaj Italio (Sudtirolo kaj Romo).

Lingvoj kaj dialektoj min interesis ekde mia junaĝo. Krome mi instruis profesie la germanan lingvon. Mi indikas tiujn personajn informojn por komprenigi, kial mi intense sentigas mian bedaŭron pro la neatingo de vera efika dulingveco francgermana. Kial ne eblis sentiĝi amase al niaj homoj, ke tiu dialekto estas trezora ilo por efika rego de la germana? Kial ne eblis komprenigi al ili, ke tiu kono malfermas al ili vastan areon, kies kulturon tiel eblas kunĝui plej intime?

Nur aluditaj ŝtataj timoj

Kiel jam dirite pluraj elzasaj asocioj agadis ĉefe ekde 1968 por la promociado de la elzasgermana dialekto kaj la francgermana dulingveco. Ili sukcesis iom post iom rompi iujn rezistojn de la jakobena ŝtato. Cetere: ĉiu elzasano ja akceptas la nunan ĉefan rolon de la franca lingvo, kiun nun ĉiu ajn regas. Kial do tia ŝtata rezisto?

Multaj elzasanoj okulumas al la itala regiono Sudtirolo, kie samrajtas la itala kaj la germana. Aŭ ili okulumas al la najbara Svislando, kie kunvivas - ŝajne pace - 4 lingvoj: la franca, la germana. Ĉu ne eblas revii pri tia plurlingva ŝtato? Ĉu oficiala plurlingveco estus kaŭzo de divido de la ŝtato? Ĉu regiono, kiu lingve kaj kulture samus kun tiu de iama malamika najbarlando, riskus disiĝi de la franca respubliko? Ĉu la franca ŝtato timas, kio okazis en Svislando kiam ekis la Unua Mondmilito? Tiam la svisoj komencis disdividiĝi laŭlingve inter subtenantoj al Francio aŭ al Germanio? Venis vigla reago: kadre de la ĝenerala membrokunveno de la Nova Societo Helveta la svisa verkisto *Karl Spitteler* (1845-1924) prononcis paroladon kun la titolo: "Nia svisa starpunkto". Tiu alarma kaj klarga teksto estis poste tradukita al la lingvoj franca, germana kaj romanĉa. Svisio ne disdividiĝis kaj *Spitteler* ricevis en 1919 - kiel unua svisa verkisto - la Nobelpremion pri Literaturo. ■

La aldona valoro de la minorigitaj lingvoj

Urtzi Urkizu

El la eŭska ĵurnalo *Berria*, 28.11.2024

Traduko fare de *Nicolas Xill Carvalho*

Dum du tagoj oni celebris en la *Kursaal*-palaco de Donostio la kongreson “Lingva profito. Avantaĝoj de lingvoindustrio en la ekonomio”. Tridek prelegantoj parolis pri 15 minorigitaj lingvoj.



Ĉiu minorigita lingvo havas propran situacion. Ĉiuj havas sian valoron, kaj dum du tagoj oni pristudis iliajn nuntempajn defiojn en la kongreso *Hizkuntzen irabazia* (Lingva profito)¹. *Langune Euskal Herriko Hizkuntza Industrien Elkarteak*² kaj *FUEN*³ organizis la kongreson en la *Kursaal*-palaco de Donostio. Prelegis kelkaj reprezentantoj de asocioj de 15 minorigitaj lingvoj. La unuan tagon ĉeestis la prezidanto de la Eŭska Registaro, *Imanol Pradales*.

1 La kompleta titolo de la kongreso estas: *Hizkuntzen Irabazia. Benefits of language industry in the economy*. (Esperanto: Lingva profito. Avantaĝoj de la lingva industrio en la ekonomio).

2 Eŭska Asocio de Prilingvaj Industrioj.

3 *FUEN*: Federa Unuiĝo de la Eŭropaj Nacimallimultoj.

Por komenci la duan tagon la deputito pri fisko kaj financoj de la Gipuska Forua⁴ deputitaro, *Itziar Agirre*, parolis pri la eŭskaj fiskaj stimuloj: «Pri la aŭdvidaj produktaĵoj la produktistoj kaj la plenumaj produktoroj havas la eblon utiligi la fiskajn dekalkulojn. Ankaŭ ekzistas fiskaj stimuloj por la publikaj spektakloj kaj la libroeldonado.»

Respondante la demandojn de la prezentanto *Ekhiñe Atorrasagasti*, la muzikisto *Olatz Salvador* klarigis, ke estas kreantoj, kiuj povus plenigi stadionojn kaj grandegajn koncertejojn pere de eŭska muziko, sed ke ili estas “escepto”. «Ĉiamaniere, multas lokoj en la mondo, kie estas intereso pri la eŭska kaj kie oni aprezas la eŭsklingvan kreadon. Foje ni mem starigas la limojn.»

4 Forua: PIV-a vorto signifanta: speciala leĝaro tradicia de iu urbo, regiono.

Sorabe kaj kimre

Por la prelegrondo pri “Ciferecigo de la amuzindustrio en minorigitaj lingvoj” *Harro Hallman*, respondeculo pri komunikado de la Ligo de la Germanaj Ŝlesviganoj⁵, asocio de la germana minoritato en Danio, faris la prezenton. *Luistxo Fernandez*, reprezentanto de la entrepreno *Codesyntax*, parolis pri la aplikaja demandludo *Egunean Behin*. «En nia entrepreno laboras 24 personoj. Ni realigas diversajn projektojn, kaj unu el ili estas la ludo *Egunean Behin*⁶.» *Codesyntax* faris ankaŭ aliajn aplikajojn.

5 *Bund Deutscher Nordschleswiger*.

6 *Egunean Behin*: “unu fojon tage” en la eŭska. Ĝi estas demando-kaj-responda ludo uzebla sur saĝtelefona aplikajo, kreita de la kompanio *Codesyntax* en 2019. La uzanto povas ludi nur unufoje ĉiutage, li devas marki la ĝustan respondon en 10 demandoj el la tri ebloj prezentitaj al li. NdR

Dum la pandemio *Egunean Behin* havis 90 000 ludantojn. «Plejmulton el la demandoj ni faras pere de la metodo de informadika programado.» Hodiaŭ mem ludas ĉirkaŭ 40 000 uzantoj, 250 000 partiojn ĉiusemajne.

«Ni faris rektajn partiojn en la televido, trifoje, sed la produktado estas komplika kaj multekosta.» Oni provis produkti *Egunean Behin* en la kataluna, sed ĝi ne sukcesis; ĝi daŭris du periodojn kaj havis ekonomiajn perdojn. «En la kimra, kontraŭe, ĝi funkcias bone.» *Fernandez* anoncis, ke *Code-syntax* ekfunkciigos alian ludon en januaro.

Adam Edwards, direktanto de la kimra entrepreno *Tinint*, klarigis, ke ili protektas la lingvon. Kimrio havas 3 milionojn da loĝantoj, kaj nur 300 000 loĝantoj uzas la kimran ĉiutage; 850 000 homoj scias paroli tiun lingvon. «Ni volas atingi milionon da parolantoj ĝis 2050», klarigis *Edwards*. «Ni faras grandan investon en la lingvo, kaj ni devas garanti, ke la investo revenos. Ni havas gravan respondecon.» Aliflanke, vidinte la sukceson de *Egunean Behin*, ili organizis laborskupon por ĝin fari en la kimra. La kimra ludo atingis 20 000 uzantojn. *Tinint* prilaboras ankaŭ aliajn projektojn, kunage kun aliaj agantoj: ili faris ekzemple serion en Jutubo pri la keltaj migradoj. *Edwards* parolis kun espero: «*Jörg Hübner*, doktoro pri ekonomio kaj spertulo pri ludoj en la soraba, parolis pri ludo “kiun amas la adoleskantoj”: *Krabat*. «*Krabat* estas aventura ludo. Ĝi iusence estas interaga animaciaĵo.» *Hübner* rimarkigis, ke videoludoj gravas por veki la intereson por lingvo kaj kulturo. *Krabat* estas rolludo konata inter la sorabparolantoj, kaj tion oni utiligis por krei la ludon en 2001. La soraban oni parolas en la germania regiono Luzacio⁷, kaj por tiu lingvo la videoludo estis mejloŝtono. Oni tradukis *Krabat* ankaŭ en la anglan, kaj danke al tio oni surmerkatis ĝin internaciskale. «Por la infanoj ni kreis ankaŭ *Krabat*-materialon. Foj-foje ni havis helpon de Jutubo.» Por la videoludo oni ricevis

100 000-eŭran publikan monhelpon. «La monhelpo tre malgrandas.»

Aŭd-vidiloj

Aliflanke, en la prelegrondo pri “Graveco de la ciferecigo en minoritatlingvaj aŭd-vidaj produktaĵoj” *Johan Haggman*, konsilanto pri eŭropaj politikoj en la asocio FUEN, faris la prezentadon. *Arantza del Pozo Etxezarreta*, direktoro de la esplorcentro *Vicomtech*, prelegis pri aŭtomata subtekstado. En aŭdvida produktaĵo la teknologio ebligas transskribi la diritajn parolojn kaj ilin konvene grefti sur la ekranon. Kun tia celo oni kreis platformon. «Sed okazas eraroj, kaj tiujn oni povas korekti en la platformo mem.» Oni subskribis interkonsenton kun la eŭskaj radio kaj Televido EITB⁸, tiel *Vicomtech* rajtas utiligi la ĝustigojn de subtekstoj de la programoj produktitaj por la Eŭska Televido, ene de la entrepreno ETB⁹.

Krom tio, oni komencis la aŭtomatan subtekstadon por rekta elsendfluo. «Estas 10-15-sekunda intertempo, ĝis la elsendfluo atingas la ricevanton, kaj tion ni utiligas per la artefarita intelekto por aŭtomate meti la subtekstojn. Kelkaj aliaj entreprenoj komencis utiligi tiun teknologion por la elsendfluo.» Kiu estas la celo? Aŭtomate subteksti la rektajn elsendojn. Oni faras testojn, ekzemple dum lernejoj kunsidoj. «Ĝi estos uzebla en la venontaj jaroj.»

Iona Mercer kaj *Mirren Buchanan* laboras en projekto por instrui la gaelan en la skota MG Alba-televido kune kun la gaellingva elsendo de BBC¹⁰, *Speak Gaelic*. En Skotio la gaela havas 70 000 parolantojn. La prelegantoj reliefigis, ke fundamente gravas disvastigi la gaelan en la aŭd-vidaj platformoj. Rilate la projekton *Speak Gaelic* ili disvolvas diversajn formatojn: televid-serion, podkaston, materialon por lernejoj... Ĉio ĉi estas atingebla en Jutubo kaj aŭdplatformoj. Ili uzas ankaŭ la sociajn retojn en interreto por atingi la junulojn. En

Instagram ili havis antaŭnelonge 10 000 sekvantojn kaj nun 63 000. «La junuloj petas mallongajn enhavojn. Ni kreas, ke niaj enhavoj estas efikaj», diris *Buchanan*. Ĉi-jare ili ekmarŝis en *Tiktok*, kaj ili estas akirantaj multajn sekvantojn. Ili kreas enhavojn pensitajn ĝuste por tiu socia reto. «Nia enhavo estas tre proksima al la ricevanto», diris *Mercer*. «Ni fieras pri niaj memoj¹¹.» Tiamaniere ili allogas multajn junulojn. «Ni kiel lingva komunumo devas uzi la gaelan, kaj ni devas atingi, ke la junuloj uzu tiun lingvon: oni ne povas limigi sin al la lernejoj.»

Joxe Felix Auzmendi, prezidanto de laproduktejo *On Time*, parolis pri la situacio en Eŭskio. Lia entrepreno produktas aŭdlibrojn kaj podkastojn. «Foje ni malĝojas, ĉar oni produktas enhavojn, sed necesas uzantoj. Ni estas tre malgrandaj en tiu ĉi arane-reto cifereca. Ni devas trovi nian loketon kaj utiligi la oportunon de la eŭska.» Al *Auzmendi* ŝajnas, ke strategio necesas. «La enhavojn oni devas kolekti kaj ordigi kaj komuniki bone al la homoj, kie ili troviĝas. Ĉar ofte la homoj ne scias, kie troviĝas la eŭsklingvaj enhavoj.» Li donis ekzemplon pri la platformo *Audible*: tie estas 32 aŭdlibroj en la eŭska, kaj el tiuj, multaj rakontoj estas “en bedaŭrinda stato”. «La eŭska bezonas elstarigon Tion zorgi nepre necesas. Aliflanke, ni bezonus kunigan platformon por la eŭska.» Li aldonis, ke oni devas krei enhavojn “specife” por la sociaj retoj. «Por ĉion konigi ni bezonus ciferecan observejon, konsistigita de junuloj.» ■

10 *British Broadcasting Corporation*. La publika televido de Britio.

11 Nepiva termino, la esperanto-Vikipedio donas klarigon el kiu mi citas la komencon: «La termino “memeo” nomas ĉian eron de kultura informo, kiun unu menso transdonas al alia menso. Ekzemploj estas pensoj, ideoj, teorioj, kutimoj, kantoj, dancoj kaj tiel plu. Laŭ la teorio de kultura evoluo, memoj reproduktiĝas kaj evoluas laŭ maniero simila al genoj en biologia evoluo. Tiu ĉi termino estis enkondukita en la anglan fare de la brita evolua biologo *Richard Dawkins*, kadre de la libro “Egoisma geno” (*The Selfish Gene*) en 1976. Laŭ lia propono, ambaŭ - memoj kaj genoj - evoluas per la malsimila kapablo je pluvivado de iliaj diversaj replikoj dum ili klopodas adaptiĝi al ilia vivmedio.». NdR

7 Altsorabe Łužica, malaltsorabe Łužyca, germane Lausitz.

8 *Euskal Irrati eta Telebista*. Eŭskaj Radio kaj Televido (EITB). Temas pri la publikaj entreprenoj pri radio kaj televido de la eŭska aŭtonoma komunumo en Hispanio.

9 *Euskal Telebista*. La Eŭska Televido (ETB), ene de la entrepreno EITB.

La sukcesoj de amazoniaj indiĝenoj dum la COP16 pri biodiverseco

Nicole Margot



Fine de oktobro 2024 la ŝtatoj subskribintaj la UN-Interkonsenton pri Biologia Diverseco (IBD)¹ de Rio-de-Ĵaneiro en 1992, kunvenis en Kallio (Kolombio) por la 16a COP².

Tiu konferenco devis pridiskuti kaj konkretigi la tutmondan kadron de *Kumming-Montréal*, strategia plano por la jardeko 2020, adoptita en decembro 2022 dum la 15a renkontiĝo de IBD. Inter la 23 celoj de tiu traktato, atingendaj ĝis 2030, oni antaŭvidis protekti 30% de la teroj kaj maroj. Por tion atingi necesas tutmondaj jaraj elspezoj de po 200 miliardoj da dolaroj. Sed post dek du tagoj da diskutado la riĉaj landoj insiste rifuzis kreon de nova fondaĵo por la naturo kaj la konferenco finiĝis prokrastante decidon pri tiu ĉefa punkto.

Dum la rezulto de tiu konferenco montriĝis negativa, multe pli pozitivis la agado de la indiĝenaj popoloj ĉeestantaj la renkontiĝon. «La aŭtoktonaj ĉefoj de la naŭ landoj kundividantaj Amazonion, nome Brazilo, Kolombio, Peruo, Bolivio, Ekvadoro, Venezuelo, Gujano, Franca Gujano kaj Surinamo, unuigis sian forton por defendi la naturon en

kiu ili vivas; tial ili kreis “G9 de aŭtoktona Amazonio” por kunordigi agadojn celantajn la defendon de Amazonio, de la aŭtoktonaj popoloj, de la biodiverseco kaj de la tutmonda klimato. Per tiuj unuigitaj voĉoj la nova alianco celos influi la tutmondajn decidojn, insisti por ke la registaroj de la tuta mondo rekonu la aŭtoktonajn grupojn kiel ĉefajn moralajn aŭtoritatojn pri protektado de ekosistemoj, diverseco de la specioj kaj pri la klimato», skribas la reta revuo *Natives*³.

Kiel regiona koalicio la reprezentantoj de tiu G9 celas intensigi la premon sur la registaroj de la tuta mondo por ke ili agu favore al la klimato. Ili ankaŭ volas insisti por ke tiuj registaroj ellaboru komunan programon por la COP30, pintkonferencon pri la klimatsanĝoj okazonta en novembro 2025 en Belemo (Brazilo). G9 ankaŭ alvokas al “konservado de la biodiverseco” kaj al respekto de iliaj rajtoj je la amazoniaj teroj. Ili petas “rektan financadon” por ebligi aŭtonoman mastrumadon de siaj projektoj de konservado kaj de daŭripova disvolviĝo laŭ siaj tradicioj kaj propraj regadaj sistemoj. Ili opinias havi moralan aŭtoritaton pri ekosistemoj kaj klimatprotektado, ĉar ili ĉiam agis favore al la naturo, kvankam ili ne ricevas por tio taŭgan financadon kaj ne raj-

tas partopreni la internaciajn diskutojn pri mediprotektado. Ili asertas, ke ilia kontribuo devas esti rekonata internacie de la registaroj, kiuj, laŭ ili, plurfoje malsukcesis fronti la krizojn pri klimato kaj biodiverseco.

La kreo de tiu G9 okazas fine de jaro eksterordinare seka por la Amazonia regiono. Kolombio ekzemple travivis tioman sekecon, ke la akvonivelo de la riverego Amazono malaltiĝis je 90 procento, en ĝia trafluo de la lando.

Laŭ la ekspertoj, se la senarbigado de Amazonio superas 20 procentojn de ties surfaco, ĝia detruado fariĝos nemalfarebla, kaj tiu detruo jam atingis 17 procentojn. La plej grandaj aŭtoktonaj asocioj de Brazilo publikigis komunik-aĵon, en kiu ili deklaras, ke ili ne plu permesos petrolan kaj gasan ekekspluatadon sur siaj teritorioj, kaj ke ili postulos kunprezidantecon de la COP30. «La indiĝenaj popoloj necese kontrastas kun la ŝtatestroj, kiuj plu faras tro malmulte por la medio», deklaris la kunordiganto de la NRO 350.org⁴. «Eĉ sen taŭga financado kaj helpo la tradiciaj popoloj taŭge agas por protekti siajn teritoriojn. Ili estas gvidantoj pli ol necesaj survoje al la COP30.» Malgraŭ tio ili plu suferas persekutojn kaj provojn malhelpi ilian ĉeeston». ■

1 Anglalingve: *Convention on Biological Diversity (CBD)*.

2 Anglalingve: *Conference of the Parties*, konferenco de la partioj, tio estas de la ŝtatoj kaj internaciaj organizaĵoj koncernataj.

(3) www.revue-natives.com

4 Tiu NeRegistara Organizaĵo laboras tutmonde por la klimato.

ELAN: du-plurlingva instruado en Afriko

Alain Favre



Enkonduko

Laŭ Unesko, en la mondo pli ol 4 lernantoj el 10 ne havas aliron al instruado en la lingvo, kiun ili kutime uzas. Kompreneble tio kaŭzas malfacilaĵojn en la akiro de konceptoj kaj malegalecon rilate al tiuj, kiuj povas studi en la propra lingvo.

Tiu fenomeno estas aparte grava en Afriko, kie la oficialaj lingvoj plej ofte estas tiuj de la koloniintoj – angla, franca, portugala... –, uzataj en malmultaj familioj kaj certe ne en vilaĝaj rondoj. Jam aliro al lernejo ne ĉiam estas ebla, oni do facile povas imagi, kiom malfacila estas la lukto kontraŭ analfabeteco. Ofte infanoj frue forlasas la lernejon, kaj

instruado en fremda lingvo estas inter la plej gravaj kaŭzoj de tiu bedaŭrinda situacio.

De longe oni konscias pri tiu problemo, sed enkonduko de etnaj lingvoj – eĉ de tiuj konsiderataj kiel “naciaj” kaj vaste uzataj en diversaj amaskomunikiloj – en la publikan instruadon malofte okazis.

Internacia kunagado

Post longaj pripensadoj kaj diskutoj pedagogoj komprenis, ke pli trafa edukistemo devas kreiĝi per forta apogo, interalie financa, kaj pilotado far fakuloj. Vera defio estis konvinki politikistojn, gepatrojn kaj instruistojn, kvankam

preskaŭ ĉiuj el ili konsciis, ke ekzistas grava problemo, kies nesolvado povos kontribui al malhelpo de ekonomia kaj socia disvolvado.

Tial en 2012 estis lanĉita la programo ELAN (francilingva akronimo por Lernejo en Naciaj Lingvoj) far IFEF (Instituto de Francilingvio por Edukado kaj Trejnado) kun financa kaj teknika subteno de AFD (Agentejo Franca por Disvolvado). Tiel en 13 landoj de “francilingva” Afriko, 11,5 milionoj da lernantoj en 80.000 lernejoj kaj 213.000 klasoj povis ricevi unuan instruadon en 49 afrikaj lingvoj, danke al 230.000 instruistoj. Universitata taksado montris, ke la rezultoj estas tre kuraĝigaj, la lernantoj pli bone sukcesas ol tiuj, kiuj



estas en unulingvaj lernejoj. Grava paŝo estas akiro de legado, multe pli facila en konata lingvo. Ĉar tiuj afrikaj lingvoj skribiĝas per latinaj literoj (malmultaj foje modifitaj), pli facilas legi poste en alia lingvo kaj kompreneble en la franca. En multaj lokoj nur la loka lingvo estas instruata dum la unuaj tri jaroj de la lernejsistemo. Tiel la infanoj akiras legadon, skribadon kaj bazan kalkuladojn en sia kutima lingvo.

Ĉu plu daŭros la elano?

Malfacilas trovi precizajn detalojn rilate al tiu projekto. Eĉ pri la mono investita estas kontraŭdiroj, se oni sekvas diversajn fontojn. Ŝajnas, ke AFD jam inves-

tis almenaŭ 10 milionojn da eŭroj en la projekton, kio ne estas enorma sumo por 12 landoj. En 2017 Benino retiriĝis el la programo. Ĉu tie estis apartaj malfacilaĵoj? En *Etnismo* 109 ni publikigis artikolon pri lernejo en Benino, kie temas pri ELAN, tamen post la forlaso de tiu programo, kvankam samaj principoj estis plu aplikataj.

Laŭ facile troveblaj informoj la programo tre bone funkciis en 2020. Sed en tiu jaro okazis la krizo de kovimo, kun aparte negativaj konsekvencoj en Afriko, kie lernejoj ne funkciis dum monatoj. Kaj en diversaj landoj okazis revolucioj, renversoj de registaroj, ĉefe en Sahelo. Tre malriĉaj landoj, kiel Burkino Faso, Malio kaj Niĝero, nun

havas militistan reĝimon, ili malfacile rilatas al aliaj afrikaj landoj kaj estis forigitaj el internaciaj institucioj. En ili okazas gravaj internaj konfliktoj, kaj certe la publika instruado estas tie aparte perturbita, kiam ĝi entute plu ekzistas.

Kiel statas do precize tiu ELAN-programo fine de 2024? Ĉu financa subteno plu ekzistas? Ĉu la bone orkestata malfido al "okcidento" riskas nuliĝi ĉian kunlaboradon – dum okcidentanoj mem pli kaj pli rifuzas tro kostan kaj "vanan" helpon? Internaciaj rilatoj trairas aparte gravan krizon, kiu igas reviziendaj ĉiujn formojn de kunlaboroj. Diskutoj devos okazi sur novaj bazoj... se ili plu povos okazi. ■

LA RETBUTIKO DE KEA

Trovu librojn, revuojn, diskojn
kaj aliajn varojn kaj servojn proponataj
de Kataluna Esperanto-Asocio

<https://butik.esperanto.cat>

Dum 2025,
profitu 5%-an rabaton
en ĉiuj varoj
per kupon-kodo
ETNISMO25

ESPERANTO*
CAT

*Associació Catalana d'Esperanto/Kataluna Esperanto-Asocio

Minoritataj etnoj¹ havas infanojn, sed ili transiras al la rusa lingvo²

Jaak Prozes³

Tradukis István Ertl

La ĉefa kialo de la formorto de finnugraj popoloj en Rusio estas lingva asimilado, ĉar la finnugraj lingvoj ne estas lingvoj de edukado kaj de potenco.

Lingvoŝanĝo okazas rapide, ekzemple, la nombro de mordvoj, kiuj konsideras la etnan lingvon sia gepatra draste malpliigis: dum en 1989 ili estis 740 048, en 2021 jam nur 332 829: malkresko de 407 219 homoj. La nombro de etne mordvaj civitanoj en la Rusa Federacio en 1989 estis 1 072 939 (en Sovetunio ankoraŭ 1 153 900, pli ol estonoj), sed en 2021 jam nur 484 450. Malkresko 2,5-oble.

Ĉi tio montras al ni, kio okazas kiam etno havas nek propran landon nek edukadon propralingvan, kiam jare el-

doniĝas 20-30 libroj en la etna lingvo, televide kaj radie estas elsendataj du horoj da programoj, trifoje semajne (por komparo: pli ol 3000 libroj estas eldonataj en la estona ĉiujare), kaj la eldonkvanto de la plej granda gazeto estas maksimume 3000 ekzempleroj.

Eblas ja ricevi instruadon en la mordva (erzja kaj mokša) lingvo lerneje, sed lerni la lingvon estas libervole kaj gepatroj devas doni sian skriban konsenton. Rezultas rapida formorto, esence en unu generacio, ene de 30 jaroj.

Kompare kun rusoj, tamen, la naskoprocento de la finnugraj popoloj estas tre bona! Plej malalta ĝi estas inter rusoj, kiuj ankoraŭ nombras pli ol 100 milionojn, sed kies nombro malpliigis je 5,5 milionoj kompare kun la antaŭa censo. Ĉe rusoj la averaĝa naskonombro estas 1,4 infanoj, ĉe finnugroj inter

1,9 kaj 2,3. Alivorte, la rusan popolon kun-reproduktas la finnugroj, same kiel aliaj popoloj, lastatempe precipe la tataroj. Tamen la popoloj de Kaŭkazo ne aparte elstaras pro asimiliĝo, ekzemple la nombro de noĥoj kaj avaroj konsiderinde pligrandiĝis.

Lingvoj devas ŝanĝiĝi kaj modernigiĝi por povi funkcii en ĉiuj sferoj de la vivo, precipe sur la kampo de cifereca teknologio. Necesas ankaŭ prisekvi, ke la lingvo ne falu sub la influon de unu grava lingvo kaj kulturo. Tia lingva premo povas ja bremsi la propralingvajn vortokreadon kaj pensadon, malfermante vojon al fremda lingvo en ĉiutaga komunikado inter homoj, kiuj trovas, ke pli facilas tiel komunikiĝi. Tio vidblas, ekzemple, ĉe 10-12-jaraj lernejoj, kiuj de tempo al tempo transiras parole al la angla. ■

1 En la originalo: *hõimurahvas*, "triba popolo", plej ofte uzata rilate finnugrajn etnojn, kun la kroma ideo emfazi ilian parencecon.

2 Fonto: *Postimees*, 21 decembro 2024.

<https://arvamus.postimees.ee/8158944/ak-fookus-kas-maaelu-ja-rahvasse-enesekindluse-sustimine-aitaks-ilmale-tuua-rohkem-lapsi>

3 Historiisto, ĵurnalisti (1965), aktivulo de finnugraj movadoj. En *Etnismo* 111 (30.06.2022) vi trovos du artikolojn koncerne la saman temon:

- "Novaj zorgigaj donitaĵoj pri popoloj kaj lingvoj en Rusio", p. 4.
- "La maŝintradukilo de la Universitato de Tartu nun tradukas 23 finnugrajn lingvojn" p. 20. En ĝi troviĝos kompletan mapon pri finnugraj popoloj.

Koncize el...

🔊 **Francio – prezidento Macron akuzas la regionajn lingvojn.** Dum festparolado okaze de la publikigo de la naŭa eldono de la vortaro de la Franca Akademio lastnovembre, prezidento *Macron* diris, ke la franca lingvo estas «fabrikaĵo de nacio, kiu alie malaperus inter siaj lokaj lingvoj, siaj vilaĝaj dialektaĵoj (*patois*), siaj regionaj lingvoj, kiuj plejparte plu ekzistas sed esence funkciis kiel dividiloj de la nacio». Jen kontraŭkonstitucia aserto – ĉar kultura valoro de tiuj lingvoj estas agnoskita – kiu tamen devis plaĉi al kadukula pariza aŭskultantaro. Entute ne tiom gravas, neniu plu fidis tiun malestimatan kaj senpotencigitan prezidenton. La nova ĉefministro *Bayrou*, parolanto de la gaskona dialekto, dum sia jam longa politika kariero trovis okazojn subteni la okcitanan; oni do povas esperi pli pozitivan sintenon fare de la nova registaro, kvankam tiu ĉi verŝajne riskas daŭri ne pli longe ol la antaŭa. / AF



Eblas reklami en *Etnismo*!

- Anonctarifo: (EUR): 1 p. 80, 1/2 p. 45, 1/4 p. 25, 1/6 p. 15.
- Rabato por IKEL-membroj: 10 %.



Uwe-Joachim Moritz, kreinto de *Etnismo* kaj de IKEL, forpasis

Nicole Margot

Nur post la sendo de nia somera numero ni eksciis pri la forpaso de la kreinto de *Etnismo* kaj de IKEL, honora membro de IKEL, la 13an de marto 2024.

Uwe Moritz estis aktiva esperantisto en Germanio, sed ni IKEL-anoj plej multe ŝuldas al li la ekziston mem de nia revuo kaj de nia asocio.

Li naskiĝis la 27an de novembro 1939, kaj jam en la jaro 1957, dum siaj studoj en la gimnazio, li komencis kunorganizi la tiaman novjaran Seminarion de Germana Esperanto-Junularo, de kiu li poste fariĝis prezidanto. Ekde 1960 li studis pedagogion dum kvin jaroj en la universitato de Münster. De 1960 li instruis historion same kiel la hispanan, francan kaj Esperanton en la gimnazio de Eschweiler (Nordrejn-Vestfalio) ĝis sia emeritiĝo en 2004.

Uwe, kiu parolis la platdiĉan kaj aktivis por tiu lingvo, ankaŭ interesiĝis pri la kataluna kaj havis esperantistajn amikojn en Barcelono, kun kiuj li kundiĉis agadon por la minoritataj lingvoj. La 15an de majo 1972 Uwe skribis en la unua numero de nia revuo: «*Etnismo* estos nete ne neŭtrala. Ĝi traktos ĉiujn politikajn, ekonomiajn kaj kulturajn problemojn koncerne etnojn, kaj ĝi propagandos certajn ideojn. Ni opinias, ke *Etnismo* utilos por konsciigi sian publikon pri larĝeco horizonta bezonata por funde kompreni la mondan lingvo-problemon. Luktado kontraŭ

lingva diskriminacio neniel povas limiĝi al la ŝtataj lingvoj, sed ĝi devas, kondiĉe ke ĝi estas sincera, konsideri samtempe la ŝtatinterne malfavoratajn lingvojn de etnaj minoritatoj». Li estis avangardulo en la tiam Esperantio.

En la unuaj numeroj regule aperis novaĵoj pri la Asocio Internacia por la Defendo de la Minacataj Lingvoj kaj Kulturoj (AIDMLK), en kiu li membris kun siaj katalunaj amikoj. Post insista propono de tiu grupo, la asocio akceptis esperantigi sian nomon, kaj la internacilingvaj membroj de la asocio esperis, ke Esperanto poste fariĝos ĝia laborlingvo, konsciante, ke nur lingvo politike neŭtrala povas juste defendi lingvojn plej ofte malaperintajn pro la hegemonio de potencaj lingvoj uzataj internacie en AIDMLK.

Sed la 1an de decembro 1978, en la numero 20 de *Etnismo*, Uwe Moritz esprimis la seniluziiĝon de la etnismaj esperantistoj: «Evidentiĝis [...] ke la plej multaj aktivuloj de AIDMLK, simile kiel tiuj de la esperantismaj organizoj, ne komprenas la interdependecon de la diversaj aspektoj de la lingva problemoj». Kaj li anoncis la kreon de Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL), okazintan en Barcelono du monatojn antaŭe, la 25an de septembro 1978, ses jarojn post *Etnismo*. Uwe Moritz redaktis *Etnismon* dum 30 jaroj kaj en 2003 li transdonis sian postenon al mi. Jam fine de 1998 li estis lasinta la prezidantecon de IKEL al Daniele Vitali.



Uwe J. Moritz en la arkivejo de *Etnismo*.

Dum sia prezidanteco en IKEL, li interalie konkrete subtenis la baltajn landojn en ties aŭtonomiemo de Sovetio kaj poste la sendependiĝemon de Kosovo rilate al Serbio.

La komitato de IKEL esprimas profundan malgajon pri la malapero de sia fondinto kaj konservas grandan dankemon por lia kuraĝa incianto kaj lia longa engaĝiĝo por la etnaj liberecoj. Ĝi ankaŭ varme kondolencas al lia edzino Ursel, kiu longe okupiĝis pri la financoj de IKEL kaj al ilia filino Silvia. ■

Pri Uwe-Joachim Moritz vi povas legi artikolon en eo.wikipedia.org. Tie vi ankaŭ trovos du ligojn al etaj filmoj, la unua, triminuta, raportas pri intervjuo en 1997 de Uwe far Zlatko Tišlar kaj la dua, pli longa, raportas pri televida diskuto en la platdiĉa lingvo.

Fariĝu membro de IKEL



Valorigu la liberecon kaj la diversecon,
aliĝu al la Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj
kaj ricevu **Etnismon** senpage



www.etnismo.org